

Baptujo en somera vojkirko

En Klippan, en la suda regiono de Svedio, troviĝas interesa kaj moderna preĝejo. La baptujo en la preĝejo estas impresa konko.



KELI

Kristana Esperantista Ligo Internacia
fondita en 1911, neneŭtrala kunlaboranta kun UEA

Celo: *Krei efikan kontakton inter kristanoj el diversaj landoj kaj per Esperanto diskonigi la Evangelion pri Jesuo Kristo.*

Prezidanto: Philippe COUSSON

✉ 26 rue de Pré-Ventenet,
FR 86340 Nouaillé-Maupertuis, Francio;
☎ +33 (0) 549468021; ✉ keli@chez.com

Sekretario: Pavel POLNICKÝ;

✉ Na Vinici 110/10,
CZ 290 01 Poděbrady II, Ĉeĥio
☎ +420311241406;
✉ polnickypavel@seznam.cz

Kasisto: Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS

✉ Klauzál utca 32,
HU 1072 Budapest, Hungario
☎ +36 302 000 306;
✉ agnes@raczkevy-eotvos.com

Kotizoj: Rekta membro kun gazeto, minimume €20,- • Membro-subtenanto €30,- • Nura abono: pagante rekte al KELI €16,- • pagante al Libroservo €18,- • Sendoj de okcidentaj monbiletoj per registrita letero al la kasisto de KELI. •

Se estas en via lando UEA-poŝtĝirkonto (informiĝu ĉe UEA) bonvolu prefere pagi al UEA por konto **kelk-p** de KELI • Franca bankkonto de 'KELI Ligue Chrétienne Espérantiste Internationale':
CIC-banko, BIC: CMCIFRPP;
IBAN: FR76 1009 6182 4800 0368 7480 104

Vizitu ankaŭ la tt-paĝon www.chez.com/keli/

DIA REGNO

Oficiala organo de KELI, fondita en 1908
dumonata revuo - ISSN 0167-9554

Redaktoro: Bengt Olof ÅRADSSON

✉ Nygatan 10 A; SE-281 48 Hässleholm; Svedio;
☎ +46 70 2004574; ✉ dr_board@yaho.o.se

Kontrollegis: Éva FARKAS-TATÁR, Pavel POLNICKÝ

Abonprezo sen membreco en KELI: €16,- aŭ egalvalora. Abonoj kaj anonckostoj pagotaj al la kasisto de KELI (vidu supre).

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas nur la aŭtoroj. Represo kaj traduko permesataj, kondiĉe ke oni citas la fonton. Specimenon kun represo aŭ traduko oni sendu al la redaktoro.

Ekspedado: Pavel POLNICKÝ

Vidu la adreson de la sekretario

Presado: Tiskárna ASTROprint s.r.o., Poděbrady, Ĉeĥio
✉ info@astroprint.cz

Eldonmonatoj: meze de feb, apr, jun, sep, okt, dec.

ENHAVO

De konflikto al komuneco	51
Arne Lundkvist 95-jara	53
La kaprica sorto de Pro Iŝtar	54
Kial kriadas la homoj, se ili furiozas?	56
Tuchoměřice	57
Jesuo Kristo ankoraŭ relevigas la mortintojn	58
20-a Ekumena Esperanto-Kongreso	62
Financaj raportoj	64
Informetoj	66
Āke Ahlrén - nekrologo	70
Tra nokt-malhel'	72

REDAKTORAJ VORTOJ

Ankaŭ ĉi-jare mi vizitis “someran Avojkirkon”. Ĉiam interese. La vizito donas la eblecon vidi lokan kulturon kaj kiel la loka kaj antaŭa paroĥo en sia komunumo, ekzemple per artaĵoj kaj arĥitekturo, volis laŭdi Dion. Krome la vizito ĉiam donas trankvilecon kiam oni kelkminute sid-iĝos en benko kaj iom meditas. Alia flanko ĉe niaj vojkirkoj, kiun mi multe aprezas, estas la ebleco simple kafrinki kaj iom konversacii kun la grupo kiu prizorgas la vizitojn – kroma dimensio.

La nuna gazeto kiel kutime enhavas variajn artikolojn sed ankaŭ la kutimajn raportojn por la jarkunveno dum la ekumena kongreso en Trento. En sekvonta numero mi espereble havos materialojn por publikigi POST la kongreso. Mi multe ĝojus se multaj legantoj sendos al mi materialon de siaj vizitoj kaj vojaĝoj kaj someraj spertoj.

Ĝuu la someron!

De konflikto al komuneco

Philippe COUSSON, FR

Post tri jaroj, oni memorfestos la 500-jariĝon de la agnoskita dato de la komenco de la Reformacio, nome la afiŝado de la tezoj de Martin Luther.

Post 50 jaroj da teologia dialogo inter la Luterana Monda Federacio kaj la rom-katolika Eklezio sekve de la dua Vatikana Koncilio, estis decidite ke tiu datrevena jubileo estu memorfestata de ambaŭ eklezioj, kune. Surprize, ĉu?

Cele al tiu baldaŭa komuna evento, la komuna luterana rom-katolika komisiono pri unueco publikigis komunan tekston, kiu rigardas al la lutera reformacio per la nunaj okuloj kaj post la teologiaj diskutoj kaj esploroj. Tiun tekston mi komentas.

Ĝia analizo de la eklezia situacio prezentas unue la kondiĉojn de la baldaŭa memorfestado kompare kun la antaŭaj. Ĝi poste rigardas la historiajn studojn pri Martin Luther kaj la Reformacio, kaj ĝiaj evoluoj. Per nova rigardo, ĝi prezentas laŭ diversaj vidpunktoj la historion de la luterana reformacio kaj de la katolika respondo. Detale temoj de la lutera teologio estas analizitaj, ekde la religia kaj mistika grundo de lia kompreno, kiel li klarigis tiel gravajn temojn kiel pravigo, eŭkarestio, servado (ministry), Skribo, kaj kiel ili estis tiam klarigitaj de la rom-katolika eklezio, kiuj estis la konfuzoj,

kaj kio restas kiel malsamaj komprenoj aŭ diroj.

Por komuna memorfesto kaj unueco, la bazo povas esti komuna kompreno de la bapto, al kiu aldoniĝas kvin ekumenaj devigoj.

Tiel tra la evoluo dum la kvin jarcentoj depost la Reformacio, la dokumento volas aperigi kio estas efektive komuna – kaj fakte estis jam malgraŭ la malsamaj dirmanieroj – kaj kiamaniere oni povas antaŭenigi unuecon.

Mi do levos el tiu teksto kelkajn temojn.

Pravigo kaj sanktigo

Tiu ĉi temo estis jam pritraktita de antaŭa dokumento (1999) kiun ankaŭ ni en niaj ekumenaj kongresoj pristudis, nome la Komuna deklaro pri pravigo.

Komprenoble tiu nova teksto aludas al la antaŭa. Ĝi substrekas ke en tiu afero, temas precipe pri signifo de vortoj, sed ĝenerale ne pri teologia diferenco. Kiam protestanto aŭdas la vorton “pravigo”, li ne komprenas la samon kiel povus kompreni rom-katoliko. Ekzemple en §37, oni parolas pri procezo de pravigo, kio estas bone komprenata de katoliko, sed tute ne de protestanto, kiu asertas ke la pravigo venas de Dio, estas aljuĝita al la homo per graco, ke tio ne venas de li, ke tio estas “forensika”. Tamen, la

fenomeno kiu estas la aludita procezo, estas kun kvazaŭ la sama enhavo nomita de la protestantoj kiel sanktigo. Krome, la katolikoj agnoskas ke tiu procezo ne povas komenciĝi sen la graco de Dio, kaj povas disvolviĝi nur per ĝi. Finfine, ambaŭ diras la samajn aferojn, sed per malsamaj vortoj.

Indulgencoj

Longe oni diris ke la kaŭzo de la protesto de Luther estis la vendo de indulgencoj fare de la monaĥo Tetzl, por i.a. konstrui la bazilikon de Sankta Petro en Romo. Kvankam tio estis el la riproĉoj de Luther, tio estis nur unu el la aspektoj de la tuta afero, la plej videbla tamen. Li pensis ke tiaj indulgencoj, monaj aŭ aliaj, malhelpas al la spirita vivo. Ĉar liaj tezoj diskonigitaj pli kaj pli ĝenis la monkoklekton pro indulgencoj, li estis akre atakata. Li provis defendi sin, fokusante pli ĝuste per la teksto “Prediko pri indulgencoj kaj graco”. Sed tio tute ne sufiĉis, kaj li estis ekskomunikita. La kardinalo Cajetan, bona teologo pridemandis Luteron, sed ĉar jam enestis miskomprenoj, ne eblis starigi dialogon, eĉ en postaj jaroj.

Evoluo en la deziro de Luther kaj liaj kunuloj

Malgraŭ la riproĉoj, kiujn Luther faris al Romo kaj la papo, lia unua intenco ne estis krei novan eklezion, sed strebi al reformo de la Eklezio. Sed la reagoj de la roma kurio kaj de la tuta eklezia sistemo puŝis lin al disiĝo. Tamen poste estis klopodoj por akordiĝo, kiuj ne sukcesis. Unu el ili estas la Aŭgsburga konfeso, ĉefe verkita de Melancton.

Ĉar ĝi estis rifuzita de Romo, ĝi fariĝis la ĉefa resumo de la luterana kompreno de kristanismo. Poste, eĉ Calvin subskribis tiun tekston.

Kaj en tio: politiko

Tiu nova movado devis organiziĝi, kaj en tio gravan rolon prenis la princoj. Sed poste tio havis aliajn konsekvencojn, nome militojn kaj la principon de “en ĉiu regno la religio estas tiu de la princo”. Krome okazis militoj eĉ kontraŭ aliaj protestantoj, nome la anabaptistoj. Pri tio ankaŭ, en la fino de la teksto la luterana parto petas pardonon, same kiel pri la milito kontraŭ la kamparanoj. La milita periodo finiĝis per la paco de Augsburg en 1555. Tamen, ni scias ke Eŭropo konis poste aliajn militojn, el ili kelkaj ligitaj al la religia problemo.

Kion efektive diris Trento

Dum evoluis la protestantismo, samtempe evoluis la rom-katolikismo. Oni foje parolas pri “kontraŭ-reformacio”, aŭ pri “katolika reformacio”. La ĉefa laboro estis farita dum la koncilio en Trento. Ĝi kaj insistis pri diferencoj kun la Reformacio protestanta, kaj establis teologian grundon kiu, laŭ nuntempa analizo, ne estas tiel for de protestantismo, kaj ankaŭ multe reformis la propran eklezion. Ĝi insistis pri la rolo de tradicio, sed ne klare indikis la rilaton inter la Skribo kaj la Tradicio (§80). Ĝi rifuzis la savon per la fido sola, ĉar ĝi komprenis la fidon kiel aliĝo al doktrino. Tamen, ĝi estis “protestanta” ĉar ĝi deklaris ke la origino de la pravigo estas “la justeco de Dio... per kiu li igas nin

justaj” (§82) Ankaŭ “La eterna vivo estas graco, ne nur rekompenco”. Pri la sakramentoj, ĝi fiksas la postan pozicion de Romo, malsimile al la protestanta.

Servado kaj sacerdoteco

Inter tiuj teologiaj disputitaj temoj troviĝas kelkaj kiuj restas ĝis nun, kaj inter ili la ligoj inter la sacerdoteco de la kristanoj, de la baptitoj, kaj la ordinita servado. Por Luther, ĉiuj kristanoj estas sacerdotoj. Sed ne ĉiuj estas servantoj, pastoroj. La pastoroj estas servantoj. Ili, ordinitaj, estas vokitaj al publika servo por la tuta eklezio. Ili estis ordinitaj, ĉar vokitaj de Dio kaj sendataj. Sed tio ne estas sakramento. Ĉar ne troviĝis tiam episkopo kiu akceptis ordini pastorojn, Luther kaj la reformatoroj elektis la ordinon per la pastoroj (presbiteroj). Krome, parte bazante sin sur mezepokaj tekstoj, ili diris ke ne ekzistas aparta ordino por la episkopoj (§171), kaj ke tiu, kiu ricevas la ŝarĝon de kontrolo ne ricevas kroman ordinon.

Poste (Vatikano 2a) la rom-katolikoj parolas pri la sacerdoteco de la baptitoj,

kaj daŭre insistas pri la rolo de la episkopo en la unueco de la Eklezio. Ambaŭ eklezioj difinas la servadon kiel servadon de la Parolo kaj de la Sakramentoj. Kaj estas ankaŭ aliaj komunaj komprenoj, malgraŭ ekzemple la rolo de la episkopo de Romo.

Kio restas antaŭ ni

La diskutoj duflankaj kaj plurflankaj en la lastaj jardekoj permesis interkompreniĝon pli kaj pli grandan. La diversaj disputoj de la antaŭaj jarcentoj estas iom post iom solvitaj. Ĉiu eklezio, ĉiu konfeso, bezonas penti pri la pasinteco, pri la reciprokaj suferoj kaj kondamnoj. Tamen restas kelkaj elementoj, kiujn oni devas profunde esplori.

La teksto proponas en la fino plurajn metodo-punktojn, kiujn ili nomas “devigoj”.

Unue, labori cele al la unueco kaj al komunajtoj, anstataŭ el la apartiga vidpunkto. Ni agnoskas unu la alian kiel kristanojn.

Due, la renkonto kun la alia trans-

Arne Lundkvist

95 jara

Arne Lundkvist, iĝis 95 jara la 14:an de majo. Li festis sian 95-jariĝon unue la 14:an de majo en Missionskyrkan en Värnamo kaj poste kun pli proksima rondo la 17:an de majo. Ĉeestanta reprezentanto de KELI kaj SEF ankaŭ gratulis lin.

/red



formu nin per mutuala atesto pri fido,

Trie, ni serĉu videblan unuecon en konkretaj ŝtupoj.

Kvare, por ne refali en la antaŭajn konfesiajn kontraŭstarojn, Luteranoj kaj Romkatolikoj kune malkovru la povon de la Evangelio, ankaŭ per kompreno de la ekleziaj tradicioj.

Kvine, la komuna atesto pri la graco de Dio per proklamo kaj servo al la mondo estas la misia tasko de ekumenismo, por ke la mondo kredu.

Kio pri la aliaj eklezioj

(aliaj protestantaj, ortodoksaj kaj orientaj) Tiun tekston verkis Luterana kaj Romkatolika komisiono. Kompreneble, ilia tasko rilatis al ilia komuna historio kaj

disputo. Tamen, ili ambaŭ rilatas al aliaj eklezioj. Ekzemple, la komuna deklaro pri pravigo estis poste (2006) subskribita ankaŭ de la Metodistoj.

Kiam oni prilaboras tiajn dokumentojn, oni ĉiam devas pripensi ke oni havas ankaŭ rilatojn kun aliaj, kaj la komuneco (“koinonia”) kiun oni havas kun ili ne estu detruata de tiu teksto. Tio signifas ke eĉ ne ĉeestante, la aliaj kristanaj eklezioj estas almenaŭ parte inkluzivitaj en tio.

Kompreneble, la pintoj de la diskutoj estus eble aliaj, sed la spirito restu. Ni ĉiuj estas kristanoj, kiel diras la paragrafo 220, kiuj estas baptitaj kaj kredas en Kristo.

☪



La kaprica sorto de *PRO IŜTAR*

Ed Borsboom, NL

En la jaro 1924 aperis ĉe la eldonejo Ferdinand Hirt en Leipzig la originala Esperanto-romano *Pro Iŝtar* de la aŭtoro H.A. Luyken. El vidpunkto de merkatico* ĝi havis du malfortaĵojn.

En la nomo de la verkisto troviĝis la litero y, kiu ne apartenas al la Esperanto-alfabeto. Kiel oni devas prononci ĝin? Esperantistoj ŝanceliĝis inter Luken, Leuken, Lauken kaj Lu-iken. Bona

solvo estus, adapti sian nomon al la Internacia Lingvo kiel faris Kabe, Lanti, Verda Majo; hazarde Jung kaj Engholm jam posedis de si mem elparoleblajn nomojn.

Due, eble pli malklara estis la titolo de la libro. Kion signifas *Pro Iŝtar*? Malmultaj homoj scias, ke oni adoris en Babilono la diinon Iŝtar dum la tempo, en kiu la juda popolo estis deportita al Mezopotamio longe antaŭ

la naskiĝo de Jesuo Kristo. Sed en la titolo eĉ pli ĝenis la vorto “pro”. Kiel traduki?

Generale tiu prepozicio enkondukas motivon aŭ kaŭzon de agado. Ekzemple *Pro la pluvo mi ne iris al la festo. Pro la fulmotondro arboj falis sur la vojon.* Sed la vorteto *pro* havas ankaŭ tute alian signifon. Ekzemple *Pro Dio, mi ne mortigis lin. Pro ĉiuj anĝeloj, mi ĵuras, ke mi nepre pagos.* Tiun aplikon oni indikas en la gramatiko per “potenco alvokata”. Zamenhof ofte praktikis tiun fraz-konstruon en sia traduko de Hamleto.

Kroma obstaklo bremsis la disvastiĝon de la romano. En la komenco de la 20-a jarcento gravaj esperantistoj kontraŭis la ligan de la nova lingvo al religio. Konate estas, ke en Boulogne sur Mer en 1905 gvidantaj kongresanoj volis malpermesi al la majstro lian reciton de la poemo “*Preĝo sub la verda standardo*”. Ankoraŭ en 1924 iuj recenzantoj atakis la tro religian enhavon de la esperant-lingva *Pro Iŝtar*.

Sed ne venis fino al ĝia suferado. Dek jarojn poste la faŝistoj en Germanio decides detruiri esperantajn librojn.



Andreo Cseh last-minute aĉetis i.a. la stokon de *Pro Iŝtar* kaj transportis ĝin al Hago. Dum la nazia okupado de Nederlando 1940-1945 la romano kaŝe transvivis sur subtegmento en iu lernejo.

El la ne favoraj artikoloj pri la romano sekvis, ke antaŭ multaj jaroj mi ne legis ĝin. Tamen antaŭ kelkaj monatoj mi malfermis en la IEI-oficejo** la restantajn skatolojn kun la bele kaj profesie presitaj volumoj. Subite jukis la fingroj por legi kaj kontroli la kreaĵon de Luyken. Ĉu efektive tiel malbona produkto? Okazis revelacio!

La enhavo temas pri la konspiro de Iŝtar-pastroj kontraŭ ali-religianoj, precipe judoj en Babilono. Ĉefpastrino Zalmuna enamiĝas al juna hebreo kaj tio kondukas al streĉaj intrigoj. Kaptas min la rakonto kun la ĝuste dozita suspenso. Kaptis min ankaŭ la modela lingvaĵo, kiu faras la verkon rekomendenda al komencintoj de nia lingvo. Ĉiuj frazoj, eĉ la plej freŝe uzataj, ŝajnas malnovaj kaj konataj, tiel klare travidaj kaj nature kompreneblaj ili renkontas nin. Teo Jung en sia iama pozitiva recenzo – sufiĉe escepta tiam – notis *Vereco de la historia fono, majstreca karakterizado de la personoj kaj eleganteco kaj brileco de stilo kaj lingvo envicigas la romanon en la unuan rangon.* Li pravis. Ĉu ne estas nun la momento, rehabiliti unu el niaj valoraj beletraĵoj, al kiu la sorto ne ridis?

Jam temp' esta !

*) fako, en kiu oni studas kiel plej efike vendi varojn

***) Int. Esperanto-Instituto estas la eldonejo de *Pro Iŝtar*

☞

Kial kriadas la homoj, se ili furiozas?

Kontribuis Julia SIGMOND, IT/RO

Instruisto apud la rivero Gango, antaŭ sia rita baniĝo, ekaŭdis kiam membroj de unu familio furioze kriadis inter ili. Ridetante li demandis de siaj disĉiploj:

– Kial kriadas la homoj, se ili furiozas?

La disĉiploj pensadis, poste unu el ili diris:

– Kiam ni perdas nian sinregon, ni kriadas.

– Sed kial oni devas krei, kiam tiu, al kiu vi parolas staras apud vi?

Eĉ tute mallaŭte vi povus diri al li, kion vi volas – diris la instruisto.

La disĉiploj ne trovis la respondon. Do, la instruisto tiel klarigis la aferon al ili:

– Kiam la homoj koleras unu kontraŭ la alia, siaj koroj malproksimiĝas. Pro tiu malproksimeco ili devas kriegi, ke ili aŭdu unu la alian. Ju pli koleraĵo ili estas, des pli forte ili devas krei, ĉar des pli granda estas la malproksimeco.

Kiam du homoj ekamas unu la alian, ili ne kriadas, sed tre afable, softe ili diskutas, ĉar iliaj koroj estas tre proksimaj, inter ili ne estas distanco.

Kiam ili eĉ pli forte amas unu la alian, siaj koroj troviĝas samloke, jam eĉ mallaŭte ili ne bezonas paroli, ĉar nur rigardante jam ili komprenas unu la alian. Tiel proksime ni staras unu apud la alia, kiam ekzistas amo.

La instruisto rigardis al siaj disĉiploj kaj tiel finis la klarigon:

– Kiam vi disputas, ne permesu al via koro malproksimiĝi. Ne uzu tiujn vortojn, kiuj malproksimigas vin unu de la alia, ĉar tiam alvenos tiu tago, ke la distanco iĝos tiel granda, ke vi ne plu trovos la rekondukantan vojon.

(Donace ricevita teksto)

Sigmond Julia

Tuchoměřice

Václav POSPÍŠIL, CZ

Mi ĉeestis en Tuchoměřice apud Praha ekumenajn Bibliajn tagojn en Esperanto. Kunvenis 34 esperantistoj el ses nacioj. 10 partoprenantoj estis membroj de KELI (Kristana Esperantista Ligo Internacia), ceteraj estas membroj de IKUE (Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista). Ĉefa programo en 4 tagoj de kuna vivo estis ekspliko de la epistolo far apostolo Paŭlo al Galatanoj (benediktano Wilibald Kuhnck) kaj de la epistolo al Efesanoj (pastoro Wolfram Rohloff). Inspira estis restado en iama kastelo kaj posta jezuita rezidejo. Hodiaŭ denove revivigita monumentaĵo apartenas al ekumene celata komunumo *Le chemin neuf* – Nova vojo. En la

komplekso de konstruaĵoj funkcias nova katolika ordeno, la komunumon konsistigas du monakinoj, du francaj pastroj (parolantaj ĉeĥe) kaj 5 geedzaj paroj. Pluaj membroj vivas en propraj loĝejoj. La komunumo vivas laŭ la vivo de la unua eklezio en Jerusalemo, ĝi havas ĉiujn posedaĵojn kaj rimedojn komunajn (tutmonde – ĉirkaŭ 2000 membroj). El laborakiritaj kaj ricevitaj rimedoj de siaj favorantoj ĝi subtenas la komunumojn en Afriko kaj Suda Ameriko, ekhavas kaj riparas proprajn domojn. Ĝi organizas spiritajn renkontiĝojn de geedzaj paroj kaj geadoleskuloj. Mi rekomendas ĉi tiun komunumon al via atentemo.



Jesuo Kristo ankoraŭ relevigas la mortintojn

Vilĉjo GOLDSMITH, Usono

C iujare, la kristanoj ĉirkaŭ la mondo celebris la releviĝon de Jesuo Kristo. Dum la tri jaroj kaj duono de sia tera pastreco, Jesuo relevigis: knabinon 12 jaran kiu ĵus mortis (Marko 5, 21-43); junan viron kiu mortis antaŭ kelkaj horoj (Luko 7, 11-17); sian amikon Lazaron kiu estis morta kvar tagojn (Johano 11, 1-44); kaj multajn aliajn mortintojn (Mateo 11, 1-6).

Sed se Jesuo Kristo vere relevigis la mortintojn en tiu tempo, ni rajtas esperi ke Li faru tiajn miraklojn hodiaŭ. Fakte ekzistas multaj, multaj rakontoj de homoj kiujn Jesuo relevigis en la moderna tempo. Mi nur prezentas tri el tiaj okazoj en ĉi tiu artikolo.

Knabeto relevigita en Hindujo

Je la dek oka horo en la tago de aprilo de 2001, kvin jara Arjun hazarde estis elektro-mortigita en Novdelhio, Hindujo. Liaj gepatroj portis lin al kliniko kie la homoj laboris kun la kadavro du horojn, sen sukceso. La kuracisto postulis de ili 5.000 rupiojn kaj diris ke ili devas alvoki sepultiston.

Anstataŭ fari tion, la gepatroj telefonis al Rodrick, pastoro de proksima evangelia preĝejo. Li venis al la hejmo de la familio, kune kun Savitri, el la personaro de la paroĥo, kaj du aliaj kristanoj. La grupeto komencis preĝi ĉirkaŭ la kadavro je la 22-horo kaj ili

preĝis ses horojn. Je la kvara matene, Arjun subite releviĝis – sen iu cerba difekto.

James Rutz raportas ĉi tiun okazaĵon en sia libro “Mega Shift” (‘Mega Ŝanĝo’, paĝoj 3 & 4). S-ro Rutz persone havis renkontiĝon kun Arjun, lia patrino, Mina, kaj Savitri. (Iliaj fotoj aperas inter la paĝoj 136 & 137.) Arjun estas normala knabo; li nur portas malaspektan cikatron malantaŭ sia maldeksta orelo kie la elektra drato frapis lin.

Savitri estas 60 jara vidvino el la 'Dalits' (‘netuŝebluloj’, la plej malalta kasto el la hinda societo). Ŝi pasigis sian vivon balaante la stratojn. S-ro Rutz demandis ŝin kiom da releviĝoj en kiuj ŝi partoprenis dum siaj ses jaroj en religia servo. Ŝi trankvile (sen fiereco) respondis 'dek ses'! Pripensu, ĉi tiu humila, analfabeta virino kiu konvertiĝis al Jesuo Kristo el la hindua religio, estas valora ilo de Dio por relevigi dek ses mortintojn! Ŝi montras la veron de tio, kion la apostolo Paŭlo skribis en 1-a epistolo al la Korintanoj 1, 27-29:

Sed Dio elektis la malsaĝajn objektojn de la mondo, por hontigi la saĝulojn; kaj Dio elektis la malfortajn objektojn de la mondo, por hontigi la fortajn; kaj la malnoblajn objektojn de la mondo, kaj la malestimatajn Dio elektis, kaj eĉ la nerealajn, por neniigi la

realajn; por ke neniu karno fieru antaŭ Dio.

Tia miraklo kiel tiu, kiun mi raportas supre, ne okazas nur en Hindujo. Ne gravas la lando, la kulturo, la lingvo, la ekonomia stato, sinceraj kristanoj kiuj fidele obeas la Vorton de Dio, spertas miraklojn kiel normalaj eventoj en siaj vivoj.

Kristo relevigas mortintojn en Kongolando

Mi ĉerpis la sekvan informon el intervjuo kun s-ro Craig Keener, kiu aperis en la tre konata revuo “*Christianity Today*” (“Kristanismo Hodiaŭ”), la eldono el decembro de 2011. S-ro Keener estas profesoro de Nova Testamento en *Asbury Theological Seminary* (Asbura Teologia Seminario) en la urbego Wilmore, en la ŝtato Kentucky. S-ro Keener estas tre klera homo: li verkis 15 librojn kaj pli ol 100 liaj artikoloj estis publikigitaj en diversaj gazetoj.

La edzino de s-ro Keener nomiĝas Me'dine Moussounga; ŝi devenas el Kongolando – Brazzaville. Dum vojaĝo kiun s-ro Keener faris kun Me'dine al Kongolando, ili vizitis ŝian preĝejanaron kiu apartenas al la “Eglise Evangelique du Congo” (Eklezio Evangelia de Kongolando). S-ro Keener interparolis kun la anoj el la preĝejanaro. Sep (7) el ili rakontis ke ili individue observis releviĝojn de mortintoj.

Unu el tiuj personoj estis la bopatrino de s-ro Keener. Parolante per tria lingvo kaj Me'dine tradukante, la bopatrino rakontis ke antaŭ kelkaj jaroj alia filino

Therese estis mordita de venena serpento. Kiam la patrino atingis Theresen, la knabino jam ne spiris. Ĉar medicina helpo ne estis disponebla, la patrino ligis la senvivan knabinecon al sia dorso kaj ŝi kuris al najbara vilaĝo. Tie amiko kiu estas evangelisto preĝis por la knabino kaj ŝi ekrespiris. S-ro Keener demandis la bopatrinon kiom da tempo Therese ne spiris. Ŝi pensis: “Mi kuris supren tiun monteton kaj mi kuris malsupren tiun monteton.” Tiam ŝi respondis ke Therese ne spiris dum tri horoj. La bopatrino kuris TRI HOROJN meze de la terura afrika varmego! Kaj Therese suferis nenium difekton de la menso. Ŝi iĝis plenaĝulo, studis en la universitato, kaj ricevis la magistran diplomon.

Sed se Jesuo Kristo vere relevigis la mortintojn en tiu tempo, ni rajtas esperi ke Li faru tiajn miraklojn ankaŭ hodiaŭ.

Kiam s-ro Keener estis juna viro, li estis ateisto. Li postulis pruvon ke Dio ekzistas. Dio donis al li tiun pruvon; la ĉeesto de Dio subite estis tie en la ĉambro. Du tagojn post sia konvertiĝo, s-ro Keener timis ke li ne faris tion ĝuste; tial li petis ke pastoro preĝu kun li. Denove la majesta ĉeesto de Dio subigis lin. Mankis al li sufiĉaj vortoj por laŭdi kaj danki Dion. Tiam li komencis paroli en nekonata lingvo. S-ro Keener neniam sciis pri tio antaŭe. Sed la parolado en

nekonata lingvo estis kutima evento en la tempo de la praeklezio kaj ĝi ofte okazas nuntempe. (Agoj 2,1-13; 10, 44-46; 19,1-6; 1 Korintanoj 14,1-40).

Virino mortinta 44 minutojn, releviĝinta

Mia edzino kaj mi ĉeestas la diservojn de evangelia paroĥo ĉi tie en nia urbo Watonga, en la ŝtato Oklahoma. Dum multaj jaroj, s-rino Ŝaron Lee estas la pastorino de la malgranda preĝejo.

S-ro Guy Peh estas evangelisto el Kameruno, Afriko. Ekde 17 jaroj, li loĝas en la urbego Dallas, Teksaso. Li estis predikinta en serio de diservoj de la preĝejo de s-ino Lee. La lastan parton de oktobro 1999, li telefonis al Ŝaron kaj diris ke li dezirus veni al Watonga por prediki en aliaj diservoj de ŝia paroĥo. Ŝaron klarigis al s-ro Peh ke mankas mono por pagi por lia vizito. La evangelisto respondis ke tio ne gravas, kaj li insistis veni.

La diservoj kun s-ro Peh komenciĝis la unuan parton de novembro. S-ino Lee estis flegistino en rifuĝejo de maljunuloj en alia urbeto. La 6-an de novembro, la estraro de la rifuĝejo ne volis doni liberan tempon al Ŝaron por ĉeesti la diservon de ŝia preĝejo. Tial ŝi surmetis sian blankan uniformon kaj prepariĝis por iri al sia laborloko. (Ŝia labortempo estis de la dek kvina horo ĝis la dudek tria horo.)

Subite la koro de Ŝaron komencis pulsi tre strange. “Mi ne sentis doloron,” Ŝaron diris, “nur ke mia spirito drivas for el mia korpo.” Ŝi haltis ĉe la proksima hejmo de sia fratino Janet. Ŝaron

petis ke Janet portu ŝin al la krizĉambro de la malsanulejo en Watonga. Survoje, Ŝaron telefonis al anoj el sia preĝejo kaj petis ke ili preĝu. Ŝi ankaŭ telefonis al sia edzo Larry kaj petis ke li venigu Guy Peh al la malsanulejo.

Kiam Ŝaron, ŝiaj familianoj kaj geamikoj alvenis la malsanulejon, d-ro Ashfaq renkontis ilin. “Ŝi tre ŝvitis kaj subite ŝi forpasis,” diris la kuracisto. D-ro Ashfaq kaj la flegistinoj laboris kun Ŝaron, donante al ŝi oksigenon kaj 20 elektrajn ŝokojn. Proksimume 100 personoj ĉeestis tie en la malsanulejo. Evangelisto Peh gvidis la preĝadon. Li tiam bone komprenis kial Dio forte pelis lin por ĉeesti en Watonga je tiu tempo. S-ro Peh laŭte preĝis, riproĉante “la spiriton de morto.” D-ro Ashfaq, kiu estas islamano, diris ke li neniam estis aŭdinta tian preĝadon.

Doninte al Ŝaron oksigenon kaj elektrajn ŝokojn dum 10 aŭ 15 minutoj sen sukceso, d-ro Ashfaq deziris haltigi la penadojn por revivigi ŝin. La kuracisto klarigis ke post tiom da tempo, la difekto de ŝia cerbo certe estas neinvertigebla. Janet (la fratino de Ŝaron) ege insistis ke la penadoj daŭrigu. Kiam evangelisto Peh eksciis pri la certeco de difekto al la cerbo, li metis siajn manojn sur la kapon de Ŝaron kaj komencis preĝadi ke Dio revigligu ŝian cerbon.

Post 44 minutoj, la koro de Ŝaron mirakle komencis funkcii normale. Malgraŭ ke d-ro Ashfaq kaj alia kuracisto avertis la familianojn de Ŝaron ke ŝia cerbo certe estas 'morta' kaj ke ŝi ne povos vivi normalan vivon, ili insistis ke ŝi estu transportita al malsanulejon

en la ĉefurbego Oklahoma City (pli ol 100 kilometrojn for). Tie en la urbego, Ŝaron estis operaciita kaj du tubetoj estis metitaj en ŝian koron. Ŝi restis en komato. Larry (la edzo) rakontis al mi ke post sep tagoj de komato, li kaj Janet konversaciis flanke de la lito de Ŝaron. Ili forgesis la nomon de persono pri kiu ili parolis. Ŝaron, meze de sia komato ilin aŭskultis, kaj ŝi subite vekigis kaj provizis la nomon de tiu persono. (Multfoje personoj en komato povas aŭdi tion, kion oni diras proksime.) Morta ŝia cerbo? Certe ne!

Du ĵurnaloj de nia regiono raportis pri la morto kaj la releviĝo de s-ino Lee. Mia edzino kaj mi nur loĝas en Watonga ekde 2009, sed mi konas kelkajn personojn kiuj ankoraŭ memoras pri ŝia morto kaj ŝia releviĝo. Dek kvin jarojn poste, Ŝaron havas 66 jarojn kaj ŝi estas tre



S-ro Guy Peh

Akcela materialo de
www.guypeh.com/ministrypicturesforbooking/guy-and-like-peh/

inteligenta kaj tre vigla virino. Vere, ŝi estas piediranta miraklo.

Jesuo Kristo ankoraŭ relevigas la mortintojn!



El *Preĝo por ĉiu Tago* de Jelly Koopmans-Schotanus

23. junio

Sankta Patro, benu min por ke mi estu beno por aliaj. Torentoj de vivanta akvo eliru el mi. Mi portu al la homoj en malfacilaj cirkonstancoj veran ĝojon. Mi estu kiel fonto, kiu refreŝigas la soifantan vojaĝanton.



Mendu tiun-ĉi libreton ĉe sekretario Pavel Polnický (adreso sur paĝo 26). Tiel Vi subtenos la agadon “Stichting Zienderogen” iniciata de J. Tuinder.

20-a Ekumena Esperanto-Kongreso

Karaj

vi havas la eblecon ĉijare ekumene kongresi en Italio, en urbo grava en la eklezia historio, en Trento. Se vi ankoraŭ ne konsideris la aliĝon, pripensu vian sintenon. Krome, ĉijare estas organizita la akceptado de infanoj, kun propra programo.

Do, vizitu la retpaĝaron de KELI aŭ de IKUE, kaj ne forgesu ke vi estas atendata tie en aŭgusto.

Eble vi intencis partopreni la italan kongreson. Tiam, se vi povas veni la antaŭan semajnon, vi ankaŭ partoprenu la ekumenan kongreson.

Plej kore
Philippe COUSSON
Prezidanto de KELI

Informo pere de Karl-Heinz Schäffer pri infanaj familioj

Precizajn detalojn informis Centro Mariapoli ĉe Cadine. Tio povas esti interesa por familioj:

La infanoj ĝis tri jaroj partoprenas senpage. Tiuj ĝis ok jaroj rajtas 30% rabaton de plenkreska kotizo (€46,00), la pliaĝaj pagos la tutan kotizon. Tamen neniu infano pagos aliĝkotizon. La Centro Mariapoli disponas je ĉambroj por familioj: 3 -4-5-ĝis 8 litaj (ĉi-kaze: 2 aŭ pli da normalaj litoj kaj tri aŭ pli da kastelaj litoj) .

Tiuj kiuj alvenos per trajno aŭ buso povas anonci al mi aŭ pere de Karl-Heinz (kh.schaeffer@t-online.de) je kioma horo ili atingos la fervojan/busan stacidomon por ke mi povu esti surloke

por akcepti ilin. Tiuj kiuj alvenos unu tagon aŭ pli antaŭ la komenco de kongreso bv same sciigi min kelkajn tagojn pli frue por ke mi povu antaŭmendi tranokton/jn ĉe hoteloj aŭ studenta domo. Somere kutime pluraj turistoj vizitas la urbon, precipe en aŭgusto.

Se mi havos aliajn interesajn noticojn, mi tuj informos vin kaj se vi havas aliajn petojn mi estas ĉiam disponebla. Bonan daŭrigon de via laboro kaj korajn salutojn.

Norma CESCOTTI,
LKK
norma.cescotti@gmail.com

20-a Ekumena Esperanto-Kongreso

Kompletiga listo de la aliĝintoj ĝis 2014/05/31

034	Benedek RÁCZKEVY-EÖTVÖS	Hungario	049	Endel OJASILD	Estonio
035	Ágnes RÁCZKEVY-EÖTVÖS	Hungario	050	Joonatan OJASILD	Estonio
036	Éva FARKAS	Hungario	051	Giuseppe QUARANTA	Italio
037	Éva FARKAS-TATÁR	Hungario	052	Veronika KIRSCH	Hungario
038	Marta KEPEŇOVÁ	Slovakio	053	Ágota KIRSCH ROJIK	Hungario
039	Mária BELÁŇOVÁ	Slovakio	054	Gottfried NOSKE	Germanio
040	Pavol PETRÍK	Slovakio	055	Paola GIOMMONI	Italio
041	Carlo SARANDREA	Italio	056	Ugo TONINI	Italio
042	Miloslav ŠVÁČEK	Ĉeĥio	057	Mirosława KUBICKA	Pollando
043	Wolfram ROHLOFF	Germanio	058	Teresa POMORSKA	Pollando
044	Elisabeth ROHLOFF	Germanio	059	Tibor KEPENCAY	Slovakio
045	Theodora ROHLOFF	Germanio	060	Arcangelo DI SERIO	Italio
046	Gloria ROHLOFF	Germanio	061	Michele DI SERIO	Italio
047	Stefan LEPPING	Germanio	062	Francesco DI SERIO	Italio
048	Serio BOSCHIN	Italio	063	Paola AMBROSETTO	Italio

Tagordo por la jarkunveno de KELI 2014

- 1 Malfermo
- 2 Elekto de kunprotokolantoj
- 3 Akcepto de la tagordo
- 4 Komunikoj
- 5 Funebra memorigo
- 6 Sekretaria jarraporto
- 7 Kasista jarraporto
- 8 Raporto de la kaskontrolantoj
- 9 Diskuto kaj akcepto de la raporto
- 10 Buĝetoj
- 11 Raporto de la redaktoro de DR
- 12 Estrarelekto
- 13 Kongresplanoj
- 14 Proponoj kaj sugestoj de la membroj
- 15 Fermo

Klarigoj:

(12) Ĉi-jare finiĝas la 3-jara deĵorperiodo de Václav Pospíšil, Pavel Polnický kaj Ágnes Ráczkevy-Eötvös

Financa raporto de KELI 2013 (Ĉiuj sumoj en EUR)

		Bilancoj fine de la jaroj	
		2012	2013
Aktivoj			
	Stokoj de libroj	5.260,75	4.925,03
	Stoko de kasedoj, E-Misio	<u>116,00</u>	<u>116,00</u>
	<i>Provizo</i>	5.376,75	5.041,03
	Postuloj (IKUE, UK-lukosto)	0,00	0,00
	Kasista kaso	29,00	0,00
	Sekretaria kaso	464,80	2.520,00
	CIC ĝir-konto	731,69	763,98
	CIC ŝpar-konto	35.235,04	31.866,54
	UEA-konto kelk-p	<u>7.179,66</u>	<u>10.020,74</u>
	<i>Monrimedoj</i>	43.640,19	45.171,26
	Sumo de aktivoj	49.016,94	50.212,29
Pasivoj			
	Kapitalo	18.623,14	20.246,27
	Rezulto de la jaro	<u>1.623,13</u>	<u>1.263,85</u>
	<i>Kapitalo entute</i>	20.246,27	21.510,12
	Dumvivaj membroj	2.211,26	2.094,88
	E-Misio	6.894,51	6.894,51
	Helpa kaso	3.412,60	3.340,48
	Kongresa rezerva kaso	1.823,48	1.823,48
	Literatura/Himnara kaso	<u>12.941,57</u>	<u>12.941,57</u>
	<i>Fondusoj entute</i>	27.283,42	27.094,92
	Evidente	1.242,00	1.262,00
	Kreditoroj (brita kaso)	95,25	345,25
	Kongresaj kotizoj	150,00	0,00
	Antaŭricevitaj kotizoj	<u>0,00</u>	<u>0,00</u>
	<i>Transitaĵoj kaj pasivoj</i>	1.487,25	1.607,25
	Sumo de pasivoj	49.016,94	50.212,29

Klarigoj kaj rimarkoj pri la bilanco 2013-12-31

Aktivoj

Stokoj

Ĉi-jare ni vendis 44 Bibliojn, tiel malaltiĝis iom la sumo de Stoko de libroj. Estus bone pripensi la veran valoron de nia stoko, kaj eble pli multe sendi al malriĉaj, ne fortaj kristanaj landoj per la uzado de la Literatura / Himnara kaso.

Postuloj

En 2013 KELI ne havis postulojn de IKUE pro la lu-kosto de la salono dum la Universala Kongreso.

Monrimedoj

Kasista kaso estas ĉe Ágnes Ráczkevy-Eötvös HU, kutime kun malalta sumo. Sekretaria kaso estas ĉe Pavel Polnický CZ, kiu zorgas pri la presado kaj dissendado de Dia Regno. La monrimedoj estas en kaso kaj bankkonto de ĉeĥa sekcio de KELI. KELI havas bankkontojn ĉe la franca CIC banko kaj ĉe UEA (kelk-p).

Pasivoj

Kapitalo

En 2012 la estraro decidis, ke estonte la legacojn ni montros aparte dum tri jaroj. Estis decidita, ke kune kun la sumo de la Informada/Varbada kaso, ankaŭ la legacoj estu montritaj en la sumo de la Kapitalo. La rezulto de la jaro 2013 estis 1.263,85 Eŭroj.

Fondusoj

En 2012 la estraro decidis, ke estas vane aparte montri la sumon de la Junulara Helpa Kaso, ĝi estu kunigita kun la sumo de la Helpa Kaso.

La Helpa Kaso estas por la helpo al nepagipovaj membroj partopreni kongreson.

Transitaĵoj kaj pasivoj

EVIDENTE: 1.262 Eŭrojn la membroj donacis al Evidente en la jaro 2013. La sumo jam estas transkontigita al la fonduso Zienderogen. La brita sekcio pagis antaŭ jaroj 95,25 Eŭrojn, ili ankoraŭ ne decidis pri la konkreta celo de tiu ĉi mono. Dumjare okazis erara transfero el Finnlando de 250 Eŭroj. La mono estos reen-sendata.

Rezulto 2013 kaj buĝetoj 2013, 2014 kaj 2015 (Ĉiuj sumoj en EUR)

	Buĝeto 2013	Rezulto 2013	Buĝeto 2014	Buĝeto 2015
Enspezoj				
Kotizoj/Abonoj	2.750	1.992,78	2.200	2.000
Kotiz- kaj kursdiferencoj	0	0	0	0
Adopta Kaso	<u>700</u>	<u>1.241,28</u>	<u>1.000</u>	<u>1.000</u>
<i>Kotizoj entute</i>	3.450	3.234,06	3.200	3.000
Librovendado	100	0,00	100	100
Rentumoj	600	631,50	600	600
Profito el kongreso	<u>200</u>	<u>703,00</u>	<u>200</u>	<u>200</u>
<i>Aliaj enspezoj</i>	800	1.334,50	900	900
Enspezoj entute	4.350	4.568,56	4.100	3.900
Elspezoj				
Presisto kaj sendado de DR	3.200	2.599,00	2.700	2.800
Perantoj	<u>10</u>	<u>0,00</u>	<u>10</u>	<u>10</u>
<i>Revuokostoj</i>	3.210	2.599,00	2.710	2.810
Prezidanto	20	0,00	20	20
Sekretario	70	70	70	70
Redaktoro	250	0,00	250	250
Kasisto/Matrikulisto	<u>20</u>	<u>0,00</u>	<u>20</u>	<u>20</u>
<i>Estrarkostoj</i>	360	360	360	360
UEA-kotizo	60	61,00	60	60
Kaskontrolo	50	0,00	0	0
Bankkostoj	130	284,71	290	300
Merituloj	60	0,00	40	40
UK Lukostoj	<u>70</u>	<u>0,00</u>	<u>70</u>	<u>70</u>
<i>Ĝeneralaj kostoj</i>	370	345,71	460	470
Librovendado (kostoj)	90	0,00	20	20
Varbado (Inf./varba kaso)	20	0,00	20	20
Rabatoj de Perantoj	<u>10</u>	<u>0,00</u>	<u>10</u>	<u>10</u>
<i>Aliaj elspezoj</i>	120	0,00	50	50
Elspezoj entute	4.060	3.304,71	3.580	3.690
Saldoj	290	1.263,85	520	210

Klarigoj kaj rimarkoj pri la Rezulto 2013 kaj la Buĝetoj 2014/2015

Enspezoj

Kotizoj

La Kotizoj estis malpli ol planitaj, sed al la Adopta Kaso alvenis pli multaj mondonacoj. La Adopta Kaso estas mondonacoj de la KELI-membraro por membroj, kiuj ne povas pagi la kotizojn aŭ nur parte. Ili estas petataj kontribui "laŭforte". Koregan dankon al ĉiuj donacintoj kaj donacontoj. En 2013 enfluis 1.241,28 Eŭroj.

Aliaj enspezoj

La sumo de Rentumoj estis kiel ni planis, sed la Profito el kongreso estis pli alta ol la planita sumo.

Elspezoj

Revukostoj

La kostoj de Dia Regno enhavas kaj la presadon kaj la dissendadon. Ĉar ni bezonas malpi grandan nombron da Dia Regno, la prezo de presado iomete altiĝis.

Estrarkostoj

En 2013 la kostoj estis la planitaj sumoj.

Ĝeneralaj kostoj

Tiu ĉi kategorio enhavas en 2013 UEA-kotizojn kaj la Bankkostojn.

Aliaj elspezoj

En la jaro 2013 KELI ne pagis aliajn elspezojn.

Saldoj

La saldo de la jaro 2013 estis multe pli alta ol ni kuraĝis plani, kaj la singarde planita saldo por la jaroj 2014 kaj 2015 montras, ke la financa bazo de KELI daŭre estas kontentiga.

Buĝetoj

La Buĝeto de la jaro 2014 estas modifita en la Enspezoj pro la pli malalta sumo de Kotizoj en la jaro 2013, kaj en la Elspezoj pro la malmultigado de ekzempleroj eldonitaj de Dia Regno kaj pro tio, ke la kaskontroloj estonte okazos dum la kongreso, antaŭ la jarkunveno.

Informaĵoj

Boĵidar Leonov malsaniĝis

Laŭ peto de la filoj de prof. Boĵidar Leonov, mi informas vin, ke la 1-an de junio B. Leonov ricevis akran cerbatakon kaj falis surstrate. En la hospitalo oni konstatis, ke li suferis de duobla sangelfluo en la cerbo kaj oni faris urĝe senprokrastan operacion.



Post kvin tagoj oni denove faris duan operacion kaj nun li estas daŭre en senkonscio, kiun oni subtenas artefarite pro malfavoraj vivindikoj de la organismo....

La filo Dimiljan petis min doni mallongan tekston kaj li persone per Facebook sciigis, ke la du forumoj ne okazos. Li same petis min sciigi se eble al plej multaj eventualaj partoprenontoj kaj amikoj de B. Leonov pri lia sanstato kaj pri la neokazigo de la simpozio kaj la seminario, kiujn B. Leonov planis ...

La kuracistoj ne estas entuziasmigitaj pri lia baldaŭa resaniĝo kaj ni povas nur preĝi pri tio.

Nikola UZUNOV

www.foto-retejo-de-bibliaj-tagoj.estranky.cz/

Estimataj, laŭ instigo kaj komisiono de frato Stefan Lepping mi iniciatis novan retejon (vidu la ligon supre) kie mi intencas kolekti ligojn al ĉiuj fotografioj, filmetoj, tekstoj kaj aliaj rilataj informoj, kiuj rilatas al BIBLIAJ TAGOJ, kiuj okazis, kaj kiuj ankoraŭ okazos.

Se vi jam ie en la interreto alŝutis viajn fotojn, viajn preleg-tekstojn pri BIBLIAJ TAGOJ, sendu ilin al mi, kaj mi publikigos ilin en la nova retejo.

Se vi povas, skribu viajn artikoletojn, sendu ilin al mi, por publikigi ilin.

Mi petas vin, se vi fotis iam dum BIBLIAJ TAGOJ, aŭ dum Ekumenaj Kongresoj, kaj ankoraŭ ne publikigis viajn fotojn, sendu ilin al mi, kaj mi alŝutos ilin, por ke la aliaj partoprenintoj povu vidi ilin....

Per tiu ĉi publikigado de niaj aktivecoj ni povas akiri novajn fratojn kaj fratinojn, kaj pli entuziasmigi la ĝisnunajn partoprenintojn.

Mi antaŭdankas vin por via eventuala kunlaboro. Dio benu!

Johano JOSEFO
ingjanpospisil@seznam.cz

Joseph Freiherr von Eichendorff,

La mesaĝisto

tradukita de Manfred Retzlaff

La steloj lumigas
Jen super la land'.
El for' salutigas
Vin via amant'.

Jen pendis ĉe l' pordo
gitar' sen atent'.
Eksonis la kordo
vibrigita de l' vent'.

La ĉeporda gitaro,
Ĝi estas mia kor'.²
Trans val' kaj montaro
Ĝi svingas sin for.

Estimataj samideanoj, la poemon “Der Bote”, kiu aperis en la ĉi-jara numero 2 de DIA REGNO, mi enigis – kune kun mia ĵus farita esperantigo – en mian retan poem-kolekton “www.poezio.net”.

Mi ne estas certa, ĉu mi esperantigis la poemon adekvate, sed mi tamen sendas ĉi-kune elpresaĵon de ĝi. En mia reta poem-kolekto troviĝas jam diversaj poemoj de la poeto Joseph von Eichendorff, interalie ankaŭ tiu, kiun tradukis L. L. Zamenhof.

Salutas
Manfred Retzlaff

P.S.: En la lasta linio de la tria strofo de la poemo, sur paĝo 48 de DIA REGNO n-ro 2 (905) 2014, mankas ĉe la vorto “Gibt” la komenca litero. ☞

Ĉe la jena ligo vi trovas pli da poemoj de Joseph Freiherr von Eichendorff:
<http://www.poezio.net/version?poem-id=-1&poet-id=157>

Dankvortoj pro mondonaco

La prezidanto de Evidente (Zienderogen, nuntempe), sendis dankvortojn al KELI por la mondonaco. Li eĉ uzis kelkajn esperanto-vortojn. Jacques iomete instruis lin. Iam mi renkontis George de Jong dum mia vizito al Jacques kaj Vera.

Kore salutas, Els



Åke Ahlrén

25 majo 1918 – 6 aprilo 2014

Ake Ahlrén, mia patro, naskiĝis en Stokholmo, kaj loĝis en la urbo mem aŭ suburbo dum sia tuta vivo. Li konatiĝis kun esperanto post kiam li konatiĝis kun mia patrino, Anna-Lisa. Ŝi lernis esperanton jam kiel knabino, kaj rapide ricevis plurajn korespondamikojn en diversaj landoj.

Foje ŝi estis ricevonta viziton de leteramiko de Nederlando. Åke, kiu parolis la anglan, kaj sufiĉe bone la germanan lingvojn, pensis ke li devus helpi al ŝi traduki – ”tiu artefarita lingvo ja ne povus funkcii”...

Sed la nederlanda amiko venis, kaj la artefarita lingvo funkciis – kaj Åke komprenis nenion, dum Anna-Lisa kaj ŝia amiko babilis kaj ridis..!

Tuj post tio li aĉetis lernolibron en esperanto, kiun li diligente studis dum la lunĉpaŭzoj en la laboro. Li sukcese trapasis la altan ekzamenon de esperanto, kaj baldaŭ komencis skribi kaj traduki. Li tradukis multajn svedajn himnojn kaj kantojn en esperanton, kaj ankaŭ verkis mem.

Multajn jarojn pli poste li estis membro de la komitato (kune kun Adolf Burkhardt, W J Downes, H A de Hoog kaj Hans Amund Rosbach) kiu laboris kun la himnaro Adoru Kantante, kiu estis prezentata ĉe la KELI-kongreso en Abingdon en 1971.



Grava okazintaĵo en la esperanto-vivo de miaj gepatroj estis la KELI-kongreso en Debrecen en 1966. Tiam la tri infanoj (Lennart, Birgitta kaj Hans) estis sufiĉe grandaj por resti kun la geavoj, dum Anna-Lisa kaj Åke vojaĝis al Hungario. Tie ili renkontiĝis kaj amikiĝis inter alie kun multaj esperantistoj el Hungario kaj Ĉeĥoslovakio. Eble tiam naskiĝis la intereso por orienta Eŭropo kiun ambaŭ miaj gepatroj havis.

Åke laboris kiel oficisto en inĝeniera firmao kiu faris testmaŝinojn por paperfabrikoj. Preskaŭ hazarde, ĉar iu alia malsaniĝis, la firmao sendis lin al

foiro en Ĉeĥoslovakio en la fino de la 60-aj jaroj. ”Kaj la resto estas historio”, kiel oni diras. Āke dum multaj jaroj vojaĝis profesie en Ĉeĥoslovakio kaj aliaj landoj malantaŭ la ”fera kurteno”.

Li volonte rakontis pri sia unua vizito en Prago. Tiam li alvenis al la flughaveno, unuafoje en la lando – kaj pro ia miskompreno neniu renkontis lin. Li tiam prenis la Jarlibron de UEA, serĉis delegiton en Prago, kaj telefonis al tiu fremda persono – kiu tuj diris: ”Restu tie! Mi venos post duonhor!”

Bona reklamo por nia lingvo!

Ankaŭ post sia pensiĝo Āke multe vojaĝis, ofte al orienta Eŭropo. Dum periodo en la 80-aj jaroj li vojaĝis regule al Pila en Pollando kun la aŭto ŝarĝita kun manĝaĵoj kaj vestoj, kiujn li liveris al monaĥejo, kiu poste distribuis ilin.

Ĝis antaŭ nelonge li partoprenis en pluraj ekumenaj kongresoj. Ĉiam interesis lin kunlaboro kaj interkonatiĝo – trans kiuj ajn limoj.

Kiun ajn diskuton li povis konkludi dirante: ”Ja temas pri *homoj!*”

Āke trankvile mortis en sia hejmo post kelkaj monatoj de malfortiĝo, en la aĝo de preskaŭ 96 jaroj.

Mi ricevis la sciigon kiam mi kaj unu el miaj filinoj estis en Prago, la urbo kiun ankaŭ patro amis..!

Birgitta Gunnarson

Floradas nun la tero

ADORU 616

Sveda teksto: Israel Kolmodin (1643-1709)

Esperantigis: Āke Ahlrén (1918-2014)


- | | | |
|---|---|---|
| 1. Floradas nun la tero
kun granda bel' kaj ben'.
Vi venas, ho somero,
ekĝermas herb' kaj gren'.
Pro varma sunradio
jam cedis frost-steril'.
Kun ĝoj' vigliĝas ĉio
al renaskiĝ-jubil'. | 2. Herbejaj flor-bukedoj,
kampara nobla gren',
la riĉaj ĝarden-bedoj
kaj arba verdo-plen'
jen signoj al memoro
pri l' vasta Dia bon'
kaj Lia grac-favoro
en ĉiu jarsezon'. | 3. Aŭdiĝas birdoj trile
kun mult-varia son'.
Do kantu ni simile
al la ĉiela tron!
Animo, gloru Dion,
ĝoj-kantu Lin sen lim!
Li donas al ni ĉion
por korpo kaj anim'. |
|---|---|---|

Tra nokt-malhel'

BIG BEN



Tra nokt-mal - hel' al glo-ra cel!



Laŭ as-pra voj' al as-tra ĝoj!



1. «Jam pa - sis u - nu pli - a hor'»,
2. Al - fa, O - me - ga es - tas Vi,
3. Kris - to, ni ĉi - am se - kvu Vin,



di - ras *Big Ben.*
Splend - do de Di'.
a - mon en kor'.



Ta - goj kaj ja - roj flu - gas for:
Tem - pojn, e - o - nojn re - gas Vi.
Ĉi - am Vi a - kom - pa - nos nin,



ir' sen re - ven'.
Re - gu en ni.
ho - ron post hor'.

BIG BEN • TRA NOKT-MALHEL' • M (el la horloĝ-bato de *Big Ben*) kaj
E (origine verkita): Albrecht Kronenberger 2014-04-13

*Big Ben estas la populara nomo de la plej granda sonorilo,
kiu batas la horojn el la turo de la Palaco de Westminster,
Londono. Sed ankaŭ la turon mem oni nomas tiel.*